& Alvoko:

< Rekante 20 el 37 batoj por strofo, entute 444 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Mangada Rosenörn (Versaĵaro, Madrid 1922). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (a;Mi /La SiSi La Ti;Ti do TiTi do re;re mi fami mi do;La La TiLa Si Mi

(#Rekantaĵe: i;Mi La SiSi La Ti;Ti do Ti do mi;mi so mimi redo TiSo La doTi La So Mi dolTi La)

)×12)+

(&Strofoj:

'1 Ka/ruloj sentemaj, ; aŭskultu la diron: ; De Rusa la Gento ; vi aŭdu sopiron

(×:; **Nun paŝu atente ; per manoj sente ; la takton kaj pakton de balada la danca ĉeno2 jen**.)

'2 Infano malsata ; ploregas angore; amanta patrino ; suferas dolore. .....

'3 Por kara la filo, ; ne havas ŝi nutron, ; ĉar brusto, la ŝia, ; nur havas jam putron. .....

'4 Terura momento! ; Ŝi vidas de l' filo ; la morton, baldaŭa ; sur lia pupilo. .....

'5 De l' knabo malgrasa, ; Ne tenas la mano ; tremema, senforta, ; peceton el pano. .....

'6 Junulo malforta ; en plankon, jen, kuŝas; la Morto tragika ; lin akre ektuŝas. .....

'7 Forrabis malsato, ; malsato kruela, ; la viajn vangrozojn... ; Knabino tre bela! .....

'8 De l' Volga Popolo ; la vivo aktuala ; martiro ja estas ; pro kaŭzo fatala. .....

'9 La gentoj ankoraŭ ; heroe rezistas. ; Ĉu en ni, Homaro, ; kompato ekzistas? .....

'10 Alkuru ni, ĉiuj, ; kun nia almozo, ; ĉar estas bonfaro ; plej bela la rozo. .....

'11 Homaro rapide ; praktiku fratamon, ; al Rusa la Gento ; ni portu balzamon; .....

'12 balzamon efikan, ; balzamon de l' vivo, ; por tion alporti ; jam estas motivo. .....)